

esperanto sub LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

septembro-oktobro 2007 • numero 89 | volumo 15 - numero 5



Sakŝalmisto John Houghton muzikas por la Alan Lindsay Gordon poezikonkurso, en Melburno. (Vidu paĝojn 9-10.)

ISSN 1039-9380

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

N^o 89 • Vol 15.5 • Sept.-oktobro 2007

Redaktoro: Donald Broadribb

Eldonado:

Ĉi tiu numero estis kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per komputilo iMac; la programoj uzitaj estas Mellel kaj Adobe Photoshop; la ĉeftiparo estas *Charis SIL*, kun *Futura* por la titoloj.

Abonoj kaj membreco:

AŭD\$50 (AŭD\$25 por pensiuloj kaj studentoj). Por membroj, ekstraj ekzempleroj de *Esperanto sub la suda kruco* kostas AŭD\$3.00 + poŝtendokosto.

Pagu al la sekretario de AEA:
sekretario@esperanto.org.au

Pliaj informoj pri *Esperanto sub La Suda Kruco* troviĝas sur paĝo 31 de ĉi tiu eldono.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

☎(08)9641 1937

esk@esperanto.org.au

Pri opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

Enhavo © 2007, AEA & NZEA kaj la individuaj verkintoj.

La grafikan aspekton de la formato de *Esperanto sub la Suda Kruco* proponis Igor de Oliveira Couto.

En Ĉi Tiu Numero

Recenzo: <i>la filmo Incubus</i> [db]	3
Recenzo: <i>Neokazinta amo</i> [db].....	5
Grava korekto [Nicole Else]	6
Rondo familia	6
Anonco de la Ĝenerala Jarkunveno..	7
Lernomaterialoj bezonataj	7
Nova retprojekto efektiviata.....	7
Recenzo: <i>Vojaĝo en Esperantolando</i> ...	8
[Debra McCarney]	
La unua...en Esperanto.....	9
El la regionoj:	
Poemkonkurso en Viktorio.....	9
“La saltego” [Gaye Phillips]	11
Kanto-vespero en Suda Aŭstralio	
[Katja Steele]	12
<i>Tamen plu</i> dudek kvin jarojn	
[Katja Steele]	12
Internacia fotokonkurso de la gazeto	
<i>La ondo de Esperanto</i>	15
Konkurso por nomi la AEA-	
bibliotekon [Barrie Cledsmith] .	16
Photos for <i>EPK</i> /Fotoj por <i>EPK</i> [db]	
.....	17
Konu viajn kungesamideanojn:	
Ann Gash	20
Bonan ŝancon ĉe Radio 3ZZZ	
[Jennifer Bishop]	21
Novaj membroj/Frank Stephen	
[Stephen Pitney]	22
La oceania migrado de la maorioj	
[Brian Fox]	23
<i>Traktato de Waitangi</i>	29

Atentu!

Ŝanĝo de limdato

La limdato por *EPK* novembro-decembro estas la *5a de oktobro*.



• Recenzas via redaktoro

Incubus. Filmita en 1965. Rolas William Shatner [Marko], Allyson Ames [Kia], Eloise Hardt [Amael], Milos Milos [Incubus], Leslie Stevens [Olin], Ann Atmar [Arndis]. Reĝisoro: Leslie Stevens. Nigra-blanka filmo, daŭro: 76 minutoj. Havebla sur DVD, ĉe www.incubusthefilm.com. Prezo: Aŭs.\$42.83 inkluzive de la poŝtendo.

La intrigo:

En arbaro apud la maro, en ligna kabano loĝas juna veterano, Marko, kaj lia fratino Arndis. En tiu sama regiono aktivis juna demonino nomata Kia¹, kaj ŝia pli aĝa kundemonino nomata Amael. Marko kaj lia fratino Arndis estas honestaj bonmoraj personoj, katolikoj, kiuj strebas vivi justan kaj normalan vivon.

La du demoninoj servas la Reĝon de la Mallumo. Ilia amata tasko estas kolekti pekajn homajn animojn por li. Praktike, tio signifas trovi kaj mortigi viktimojn. Kia, kiu aspektas ĉarma kaj tre alloga junulino, logas virojn al la maro, promesante distri ilin per naĝado; sed dum la naĝo, ŝi dronigas la virojn.

Sed Kian tedeas la konstanta kolektado de pekaj animoj. Ŝin interesas la demando: kio okazus, se ŝi kolektus la animon de pia persono por la Reĝo de la Mallumo? Amael forte malkonsilas tian provon, sed Kia insistas — kaj baldaŭ ŝi vidas Markon, kiu estas

ne nur tre senpeka persono, sed tre belaspekta persono.

Kvankam Marko ankaŭ trovas Kian tre bela kaj sekse alloga, li rifuzas ŝian inviton naĝi nuda kun ŝi. Supezante ke ŝi estas ordinara homo, li deziras konatiĝi kun ŝi, sciigi pri ŝia historio, konversaciadi kun ŝi. Ŝi, sia parte, komencas ami lin, kaj eĉ deziras edzigi lin.

Panikite, Amael, la pli aĝa demonino, decidas venigi sian mastron, Incubus.² Kune Incubus kaj Amael penas kapti kaj Markon kaj lian fratinnon. Sed Marko, ekkonsciante pri la vera naturo de sia nova amatino Kia, per granda baraktado sukcesas treni sin mem kaj Kian en romkatolikan preĝejon, kie Kia homiĝos kaj ili estos sekuraj. La lasta sceno de la filmo montras lin sukcese entiranta Kian en la preĝejon.

Historio de la filmo:

En la jardeko 1960-1970 komencis abundi art-filmoj. Fariĝis laŭmode por filmamantoj en Usono spekti fremdlingvajn filmojn kun anglalingvaj subtitoloj. Projekto fari tian filmon en Esperanto kun nacilingvaj subtitoloj allogis reĝisoron Leslie Stevens. William Shatner tiutempe estis relative nova filmaktoro (en 1965 la furora serio *Star Trek* ankoraŭ ne estis komencita). Lin Leslie Stevens facile persvadis provi la novan projekton. Nemulta mono troveblis por fari la

¹ En la filmo, ĉiuj prononcas ŝian nomon “kaja”, laŭ anglalingva maniero.

² En la filmo, la nomo ĉiam prononciĝas kva-zaŭ anglalingve: ín-kju-bus.

novan filmon, nur ĉ. cent mil dolaroj usonaj. Nek Stevens, nek Shatner, nek iu ajn alia el la aktoroj kaj film-preparistoj antaŭe renkontis Esperanton. Anglalingvan tekston por la filmo ili havis, kaj ili tradukigis ĝin en Esperanton. Ili trovis kelkajn esperantistojn por informi pri la prononco de la esperantolingva teksto.

En Kalifornio, Stevens elektis Nacion Parkon Big Sur, ĉe la bordo de Pacifika Oceano. En tiu arbara parko dum du semajnoj oni provis la ensceniĝon de la filmintrigo kaj aranĝis la aparatojn por fari la filmadon. La aktoroj lernis kaj provis la ensceniĝon de la rakonto uzante la anglalingvan tekston (!) kaj penis parkerigi la prononcon de la esperantolingva traduko. Post tio oni komencis la filmadon, kiun oni kompletigis en du semajnoj.

Oni faris subtitojn por la filmita esperantolingva parolado, en la angla, franca, kaj itala lingvoj.

La filmo premieris en la Venecia Filmo-Festivalo en Italio, kaj ricevis premion. Malgraŭ tio, en Usono kaj en Italio la publikon malinteresis la filmo kaj oni baldaŭ ĉesis montri ĝin en teatroj. Kontraste, en Francio la filmo grandioze sukcesis.

Post la invento de DVDoj en 1995, oni komencis transmeti filmojn sur DVDojn. Sed kiam oni serĉis ekzempleron de *Incubus* tiucele, oni tute malsukcesis trovi ĝin en la filmokolektoj usonaj kaj italiaj. Fine oni trovis unu ekzempleron en la kolekto de Cinématèque Française. Tiu ekzemplero tamen estis tre malbonstata, kaj multa laboro necesis por ĝin transmeti sur DVD-on. La sonkvalito estis multe suferinta, kaj multa teknologia laboro necesis por

restaŭri ĝin. La subtitoj de la trovita ekzemplero estis nur franclingvaj, do oni devis ilin traduki anglan.

La kvalito de *Incubus*:

La kvanto da dialogoj en la filmo estas negranda. Bonfortune, ĉar la prononco fare de la aktoroj plejparte estas tre malbona. Malgraŭ tio, sperta esperantisto povas plejparte kompreni la parolatan dialogon. Oni ne povas tute fidi la subtitojn anglalingvajn, tiel ke relative ofte la dialogo grave diferencas de la subtitoj. En pluraj scenoj, William Shatner (kiu ĉefrolas kiel Marko) tre bone prononcas Esperanton, sed ĝenerale ne. Li tre ofte misakcentas vortojn, ofte prononcas g kiel ĝ kaj ĝ kiel g, diras “*santas*” anstataŭ “*sentas*” k.c., kaj iom longe paŭzas inter vortoj. Kontraste, Ann Atmar (kiu rolas kiel la fratino de Marko) tre flue kaj klare prononcas la vortojn. La aliaj aktoroj multe variadas rilate al sia prononco.

La intrigo estas simpla, la aktoroj bone ludas. Kvankam nur nigra-blanka, la pejzaĝo estas bela. La filmada tekniko mem estas tre bona. La iama hispanmisia konstruaĵo, kiu rolas kiel la preĝejo en la filmo, estas aparte bela kaj impona.

Oni reklamis la filmon kiel hororoplenan dramon, sed mi ne trovis ĝin tia. La deklaro sur la skatolo de la DVD: “La efekto estas maksimuma teroro” hontinde troigas. La konflikto inter bono kaj malbono estas la temo kaj bone prezentita, laŭ la principoj de la mezepokaj “moralodramoj”.

La DVD:

Akompanas la dramon, sur la DVD, tre interesa anglalingva diskuto

inter la filminto, la reĝisoro, kaj alia teknikisto, pri la spertoj kaj problemoj renkontitaj dum la filmado.

Alia, tre nekutima komentario, ankaŭ anglalingva, konsistas el detalaj komentoj de William Shatner, kiujn li faris rigardante la filmon. Tiu komentario ankaŭ daŭras 76 minutojn, kaj oni re-spektas la tutan filmon dum li komentas! Tre kurioza sperto, kun ofte tre longaj periodoj inter liaj komentoj, sed mi ĝuis aŭskulti ĝin.

Alia nelonga komentario, nomita “La malbeno fare de *Incubus*” rakontas aron da misfortunoj okazintaj al la aktoroj post la preparo de la filmo. Kiom “supernaturaj” estis la eventoj, mi lasas al la aĉetintoj de la DVD mem decidi.

.....

Lena Karpunina: *Neokazinta amo*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2007. 149p., broŝ.

Takso: 🍷🍷🍷🍷

Ĉi tiu novelaro konsistas plejparte el rakontoj premiitaj en la belartaj konkursoj de UEA dum la lasta deko da jaroj. Ĉar mi estas unu el la tri juĝistoj por la proza branĉo de tiuj konkursoj, mi renkontis en la novelaro plurajn malnovajn amikojn, kiuj nun same kiel antaŭ la jaroj plene meritas siajn premiojn.

Ĝenerale, la rakontoj esprimiĝas per la “mi-formo”, t.e., la aŭtoro mem pretendas esti la ĉefrolanto en la rakonto. Tio donas tre vivan karakteron al la verkoj, kaj ankaŭ lasas al la aŭtoro la liberon bazi siajn rakontojn parte sur realaj spertoj, kiel ankaŭ sur imagitaj.

La rakontoj havas relative simplan intrigon, kio neniel signifas ke ili estas senvaloraj literaturaĵoj. Tute male, pluraj el ili estas preskaŭ maj-

Ĉu aĉetindas la DVD? Kiel historia eksperimenta filmo, ĝi valoras; kiel artobjekto, oni povas diverse taksi ĝin. Al mi mem plaĉas ke mi aĉetis ĝin. Por Esperanto-komencantoj, ĝi ne taŭgas, pro la troa misprononcado. Por progresintaj kaj spertaj esperantistoj, ĝi povas servi kiel utila ekzercilo.

Ĉu vere la unua esperantolingva dramofilm?

Tion deklaras la skatolo de la DVD, sed efektive la dramo *Angoroj* aperis unu jaron pli frue. Laŭraporte, ankaŭ *Angoroj* akireblas sur DVD, sed malgraŭ serĉado per la Reto, mi ne sukcesis trovi ĝin. □

stroverkoj, kaj tre indas esti sur la librobreto de literaturamanto.

Lena Karpunina naskiĝis kaj pasigis la plejparton de sia vivo en Taĝikio, lando en la iama Soveta Unio, kaj tial la fono de la noveloj estas iomete nekutima por ni en Aŭstralio. Sed la temoj de la ĉiutaga vivo ne tre varias inter landoj — ni ĉiuj estas homoj, kaj frontas tre similajn situaciojn. Parto de la freŝo de rakonto bazita sur la reala vivo ŝuldiĝas al la kapablo trovi en ĝi emociajn reagojn plej ofte kaŝatajn.

La unua novelo, “Neokazinta amo” estas tia. En Esperantokongreso, juna polo vojaĝema, Gjegoj, renkontas nian aŭtoron, kaj ŝi donas al li sian adreson kaj ĝentilan inviton ŝin iam viziti en Taĝikio. Kompreneble, ŝi ne supozas ke li efektive vizitos ŝin — ja nur pro ĝentileco ŝi donis la adreson, kvankam kontraŭ la konsilo de amikino ŝia. Sed surprize, unu tagon Gjegoj ja vizitas, kaj ŝi ĉi-

ĉeronas lin en sia urbo. Reciproke li invitas ŝin veni al Pollando por konatiĝi kun lia loĝurbo. Ŝi ne tre amas turismadi, sed...

Turistado povas esti iom troa, precipe kiam la ĉiĉerono insistas montri ĉion en la urbo, kaj neglektas la fakton ke la gasto laciĝas. Du junaj

amikoj de Gjegoj afable helpas. Kaj io tre neanticipita okazas. Kio? Nu, pri tio temas la titolo de la rakonto, kaj mi ne intencas riveli al vi la misteron, ĉar ĝi estas tro ĉarma por esti senmaskigita. Mi proponas ke vi mem legu la novelon por sciiĝi. Ĉu mi vekis vian apetiton? □

Grava korekto

Nicole Else atentigis al la redaktoro:

Vi iom konfuziĝis pri la universitatoj en Sidnejo. Ekzistas ja pluraj universitatoj en Sidnejo, sed rilate al Esperanto ni interesiĝas pri 2: la University of Sydney kaj la University of NSW.

Tiu kiu havis la kurson por Esperanto-instruistoj estas la University of NSW. La universitato en kiu mi prelegis dufoje estas tute alia universitato: la University of Sydney. Kompreneble la University of NSW ankaŭ troviĝas en Sidnejo, sed mi neniam prelegis en la University of NSW.

Dua problemeto estas ke la *LOTE teaching certificate* laŭ mi ne rajtigas instrui Esperanton en aŭstraliaj lernejoj. Ni lernis instrui nur al plenkreskuloj kaj ne al infanoj. Por rajti instrui en lernejoj oni devas havi la Bachelor of Education, ĉu ne? □

Rondo Familia

Prizorgata de: Amri Wandel (estrarano kaj komisiito de UEA). Komisiono: Claude Rouget (*Familia Esperanto*), Jouko Lindstedt (prizorgado de la dissendolisto “denask-l”), Bert Schuman (IJK).

Celo: Fondita en 1994, la Internacia Jaro de Familio, por ligi esperantistajn familiojn. Registas familiojn kun aŭ sen infanoj, sendepende de ilia movada engaĝiĝo. Por enskribiĝi, oni anoncu sin ĉe la CO de UEA.

Organo: *Familia Esperanto* (FE), bulteno por kaj pri esperantlingvaj familioj (ekde 2007 rete). Redaktoro: Claude Rouget: <rypev68-netyahoo.no>.

Oni povas elŝuti la organon *Familia Esperanto* ĉe la retadreso http://www.uea.org/rondo_familia/.



Anonco de la Ĝenerala Jarkunveno Notice of Annual General Meeting



La venonta ĝenerala jarkunveno de la Aŭstralia Esperanto-Asocio okazos:
The next annual general meeting of the Australian Esperanto Association will take place:

je 11:00 atm (por 11:30 komenco)
at 11:00 am (for 11.30 start)

11:00 - 17:00
sabaton la 7an de Oktobro 2007 ĉe
Saturday 6 October 2007 at

**U3A, Level 4
150 Edward Street
Brisbane**

kaj daŭrigos, se bezonata:
and continuing if needed:

10:00 - 14:00
dimanĉon la 7-an de Oktobro 2007
Sunday 7 October 2007

**City Library
Corner George & Adelaide Streets
Brisbane**

Se vi volas pli da lokaj informoj, bonvolu kontakti:
If you would like more local information, please contact:

June Perkins
(07) 3843 6776
0421 243 437

Tagordo de la ĝenerala jarkunveno

1. Raportoj de Estraranoj
2. Raportoj de la Komisionoj
3. Elektoj de la estraro
4. Anonco pri la perpoŝta baloto pri la statuto
5. Aliaj Aferoj

Lernomaterialoj bezonataj

Por la nova grupeto de lernantoj en la niĝeria ĉefurbo Abugxo bonvolu sendi paperajn lernolibretojn kaj alian materialon kaj ankaŭ paperan informmaterialon en la angla al:

OPa Moses Gbetogo, P.O Box 250, Ajara Vetho, Badagry, Lagos State, Nigeria.

Nova retprojekto efektivigata

Kadre de la digitaliza projekto de la Aŭstria Nacia Biblioteko prilaboriĝos ankaŭ iom post iom la havaĵo de la Kolekto por Planlingvoj. Oni skanis kiel unuan parton la tiel nomatajn inkunablojn de Esperanto, t.e. la Esperanto-librojn kaj -broŝurojn inter 1887 kaj 1900. Temas pri objektoj tre

raraĵoj kaj foje eĉ unikaj. Pro la fakto, ke ĝuste tiuj publikaĵoj estas la plej ofte legataj en tiu biblioteko, la skanado signifas ankaŭ protekton de tiuj dokumentoj.

Vi povas trovi kaj elŝuti la verkojn ĉe <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm>.

LIBRO KIU INSTIGAS AL VERKADO EN ESPERANTO

recenzas Debra McCarney

Boris Kolker: *Vojaĝo En Esperantlando*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2005. 280p. Kun ilustraĵoj. ISBN 92-9017-088-3.


Jen la tria eldono de la mondfama *Perfektiga kurso de Esperanto* kaj gvidlibro pri la Esperanta kulturo. Ĝi ne estas libro por la vera komencanto, sed eĉ homoj kiuj lernas Esperanton de nur kelkaj monatoj, se ili diligente legas kaj studas la libron povas elĉerpi utilan kaj interesan informon pri la kulturo kaj historio de Esperanto, samtempe plibonigante sian kapablecon en la lingvo mem.

Vojaĝo en Esperantlando estas virtuala ĉeesto en Esperanto-klubo. Ĉiu ĉapitro prezentas kunvenon de la klubanoj kiuj prelegas, diskutas inter si kaj aŭskultas prezentaĵojn de alilanddevenaj gastoj. Per tiu metodo la leganto renkontas famajn verkistojn de la pasinteco kaj la estanteco kaj ekkonas la esperantan literaturon de la komenco ĝis hodiaŭ. Oni legas la vortojn de Zamenhof, lernas pri liaj vivbataloj, lia sindediĉo al la tasko krei veran internacian lingvon kaj lia ĝojo kiam li vidis la realiĝon de sia revo ĉe la unua Universala Kongreso en Bulonjo-sur-Mar. Oni lernas ankaŭ pri frutempaj disputoj, fendoj inter kelkaj fervoraj esperantistoj kaj la inteligenta kaj pacienca maniero per kiu Zamenhof lasis la novan esperantistaron malkovri por si mem la

ĝustan vojon sekvi.

La legantoj spertas malsamajn literaturajn stilojn, kaj prozon kaj poezion, kaj lernas verki por si mem. Ili ekkonas verkistojn de multaj aliaj landoj, kaj image aŭskultas prelegojn de alilanduloj dum ili priskribas la vivon en siaj landoj, malfermante la tutan mondon al ia imagopovo. Ĉar la verkoj venas el malsamaj fontoj, de tempo al tempo ili enhavas neologismojn. La libro nek rekomendas nek kondamnas tiujn polemikajn vortojn, anstataŭe oni legas la opiniojn de eminentaj esperantistoj pri ili, kaj S-ro Kolker lasas la leganton decidi por si mem.

Sed la sperto ne estas de nura informricevado. Se oni vere volas plibonigi sian lingvonivelon, oni devas ankaŭ produkti kaj la libro vere postulas tion. La ekzercoj je la fino de ĉiu ĉapitro enhavas multajn taskojn kiuj puŝas la leganton ekster ties “zonon de komforto”. Oni devas ne nur legi en la lingvo, sed ankaŭ krei, verki en ĝi — kaj prozon de pluraj stiloj kaj poezion. Kaj fakte, oni neniam scias pri kio oni kapablas sen iom da puŝado. Ĉi tiu libro faras tion, kaj multaj “vojaĝantoj” atestos ke ili ĝojas pri la rezulto. □

Debra McCarney estas Diplomito numero 19 de la kurso, ricevinte sian diplomon la 1-an de julio 2007. —  □



Por Ridigi Vin

Apoteko-Lernanto: “Kio estas en ĉi tiu boteleto sen afiŝo?”

Apotekejestro: “Tion vi uzas kiam vi ne povas legi la recepton.”

[el *La suda kruco* marto 1923]


La unua...en Esperanto

- La unua Esperanto-klubo estis tiu de Nurenbergo, kies volapuka societo adoptis Esperanton anstataŭ Volapukon en 1888.
- La unua literatura traduko en Esperanton estis *La neĝa blovado* de Puŝkin, tr. Antoni Grabowski, eldonita en 1888.
- La unua raporto pri Esperanto en scienca institucio estis de D-ro E. Naville, en la franca Akademio de la Sciencoj, en 1899.
- La unua esperantolingva raporto en scienca kongreso estis “Pri la kuracado per varmo”, de D-ro Krikortz, ĉe la kongreso de fizioterapio en Liege 1905.
- La unua amatora dramoprezento en Esperanto estis organizita de Aleksandro Zakrzewski, 15/27 septembro 1896. La dramo estis *Brandfaristo* de Tolstoj.
- La unua dramoprezento de profesiaj aktoroj en Esperanto estis *Ifigenio en Taŭrido* de W. Goethe, dum la UK en Dresden 1908.
- La unua preĝeja kantado en Esperanto estis organizita de Aleksandro Zakrzewski en romkatolika preĝejo de Smolensk, la 26an de oktobro 1896.
[originale raportita en *Nova Eŭropo*, represita en *La suda kruco* decembro 1922]



• El la regionoj

Poemkonkurso en Viktorio



Partoprenantoj en la poezi-verkoleciono
Fotis Kam Lee

Matene dimanĉon, la 2an de majo, dek du viktoriaj esperantistoj kunvenis por lerni la poezian teknikon. Instruisto estis Gregory Broadbent (ne esperantisto).

Posttagmeze oni diskutis pri la premio Susan Pender. Susan Pender donacas premion (alloga malgranda muldita bronza statueto de araba ĉe-

valino), kiun ricevos ĉiujare esperantolingva poemo honoranta la poeton Adam Lindsay Gordon (1833-1870).



La bronza ĉevalo, proksimume 30 cm longa. La epigrafo diras angle “Gaye Phillips 2007 gajnanto de la Susan Pender premio Adam Lindsay Gordon”.

Fotis Kam Lee.

Dimanĉon la 24an de junio grupo kunvenis ĉe la statueto de Gordon kre-

ita de Paul Montford, proksime al Parlamenta Domo.



Sakŝalmisto John Houghton muzikis dum la ceremonio.

Fotis Allan Bishop


Poste la grupo transiris al Reĝa Historia Societo de Viktorio. Estis anoncite ke la juĝisto de la konkurso, nia bone konata romanisto Ronald Gates selektis kiel la premigajninton Gaye Phillips, pro ŝia poemo “La salt-ego”. Ĉar Gaye Phillips ne povis ĉesti la ceremonion, akceptis la premion en ŝia nomo Jennifer Bishop.



Parolas Jennifer Bishop. Apude staras Susan

Pender. (Fotis Kam Lee)

Profesoro Gates ankaŭ informis ke ricevis honoran mencion Marcel Leereveld, pro lia poemo “Ĉevaloj kaj homoj”.



Adam Lindsay Gordon



Kelkaj organizantoj kaj kelkaj poeziverkistoj. Malantaŭe: John Adams, Kam lee Antaŭe: Carol Lutz, Miranda Lutz, Susan Pender, Allan Childs.



Grupo ĉeestanta



John Adams (unu el la ĉeforganizantoj de la konkurso; Susan Pender; Marcel Leereveld (honore menciita pro sia poemo “Ĉevaloj kaj homoj”)

Fotis Kam Lee

Ni esperas ke ankaŭ en venontaj jaroj egala interesiĝo pri kaj kvalito de la poemkonkurso montriĝos. □

La saltego de Gaye Phillips

Rajdantoj al vulkan' mortinta la ĉevalojn gvidis,
Kaj de la alta supro la kraterajn lagojn vidis.
En tiu grupo estis Gordon*, juna skota viro —
Ĉevalrajdisto sperta rigardata kun admiro.

Lokiĝis ligna palisaro ĉirkaŭ la kratero,
Du futojn de la rando, ĝi avertis pri danĝero.
La mur' interna de l' kratero estis vertikala,
kaj iu falo de la supro estus ja fatala.

Nun Gordon fingromontris al la ligna bariero,
Malantaŭ kiu estis la mallarĝa pec' de tero.
“Trans tion mi intencas salti”, gaje li deklaris,
Kaj senhezite la ĉevalon por la salt' preparis.

Kunuloj liaj pri l' anonco konsternitaj estis,
Kaj ili kontraŭ la stulteco de la ag' protestis.
“Sur tia eta spac' ne povas turni sin ĉevalo,
Eĉ stumblo ĉe la bretoeĝ' kondukos al mortfalo.”

Sed Gordon metis sur “Lancisto Ruĝa” sian fidon,
Kaj ankaŭ en kapablo sia havis li konfidon.
Do en orelon de l' ĉevalo flustris li komandon,
Kaj saltis super la baril' kaj sur l' krateran randon.

Kun granda peno la ĉevalo sur la ter' sin tenis,
Kaj per saltego al la firma grundo ĝi revenis.
La grupo donis al la paro grandan ovacion,
Kaj baldaŭ la event' perbuŝe kaŭzis sensacion.

Per obelisk' en tiu regiono ni honoras
Miraklan agon de ĉevalregado, kaj memoras
Ke sur la rando de krater' en Suda Aŭstralio**
Ĉevalrajdisto iĝis part' de nia historio.

* Adam Lindsay Gordon, aŭstralia poeto.

** Mount Gambier

Kanto-vespero en Suda Aŭstralio raportas Katja Steele

Iĝis jam tradicio, ke unu fojon en la jaro ni renkontiĝas en la domo de muzikema Indrani en Woodville. Ke ankaŭ la aliaj ŝatas kanti pravas la fakto, ke ni kunvenis multnombro. Ĉeestis Bob kaj Audrey, Katja kaj Trevor, Brendan kun Carol, Annie kaj Ashley, Libby kaj Arturo, Nancy, Pat kaj Eileen.



Bob kaj Indrani

Ni alvenis al la domo de Indrani sabate, la 9an de julio, je la 5a horo posttagmeze. Laŭ la anticipe preparita programo de la gastigantino kaj akompanate de ŝia pianludado kaj banĝo de Bob, ni kantis elektitajn kantojn, kiuj venis el diversaj landoj.



Trevor kaj Indrani

Ankaŭ la dua, pli longa muzika parto, enhavis kantojn el diversaj landoj, kaj Trevor malkovris, ke en ĉiu el tiuj landoj estis iam universala kongreso de Esperanto.

anto.

Tiam ni faris paŭzon. En la kuirujo atendis nin tablo plena de apetitigaj manĝaĵoj, kunportitaj de ĉiu el ni. Aparta regalaĵo estis la hejme faritaj ĉokoladoj de Indrani.

Ĉu ni kantis bele? Pli-malpli. Evidente ke ni pli bone konas la eŭropevenajn kantojn ol la aziajn. Sed ĉiun el ili ni kantis volonte kaj kun ĝuo. Estis tre agrabla vespero — ni konsentis, forlasante Indranin nur post la 8a horo vespere.

[el *Tamen Plu* julio 2007] □

Tamen Plu dudek kvin jarojn raportas Katja Steele

Tamen Plu estas la nomo de la oficiala organo de Esperanto en Sudaŭstralio. Nuntempe ĝi eldoniĝas kiel A5-formata 8-paĝa bulteno, disponebla ankaŭ rete. Same kiel ĉe la starto, ĝia redaktoro ankaŭ nun estas (Robert) Bob Felby en Adelajdo.

La ĉi-jara jarkolekto de *Tamen Plu* estas la 26-a. Ĉar ĝi venas al ni ĉiunmonate “aŭtomate”, ni ne sufiĉe ĝustatempe konsciiĝis ke *Tamen Plu* atingis jam kvaronan jarcenton. Du-

dek-kvin-foje 12 aperintaj numeroj (en la komencaj jaroj estis ankaŭ dumonataj numeroj) donas estimindan ciferon 300. Trafoliumante eĉ se nur parton de ili oni ricevas enrigardon kvazaŭ en familian albumon de la adelajdaj esperantistoj de la lasta kvaronjarcento. Same, kiel estus ĉe fotoalbumo, ankaŭ ĉi-kaze iuj eventoj pli elstaras ol la aliaj, iuj personoj eble mankas de sur la komuna bildo aŭ nur neklare videblas, sed jen

aperas ĉarma eta familia detalo, alifojte sentebblas malakordo, jen faktoj, aliloke impresoj, pensoj... Simple: bunta kalejdoskopio pri nia esperantista vivo.



Bob en 1974

Bob estas laŭdevone dano. Al Aŭstralio li venis en 1974. Jarojn post li enmigris la landon polo Zbigniew Wybraniec, kiu rakontis al Bob pri sia iama Esperantumado en la krakova universitato. La Esperanto-grupo, kiun li tie fondis, aperigis propran bultenon, nomatan *Tamen*. Kial ne fari same ankaŭ en Adelajdo?! Bob, kiu jam en Danio redaktadis Esperanto-bultenon (*Frederikssundaj frenezaĵoj*) volonte realigis la ideon kaj baptis ĝin *Tamen Plu*. Estis 1981.

Ni kune trafoliumu kelkajn el la ĝis nun aperintaj numeroj, rememoru homojn, lokojn, aranĝojn:

Tiutempe la adelajdaj esperantistoj renkontiĝadis en unu el la ejoj de la Universitato de Adelajdo. Krom Bob kaj lia edzino Audrey kunvenadis George Clarke, Thea van den Boogard, Peter Ellyard, Bert Onn kaj Beryl Randles. Presi 10 ekzemplerojn de *Tamen Plu* estis sufiĉe. Kompreneble, oni unue tajpu la tekston per tajpmasino kaj multobligu ĝin ĉe presisto.

La unuaj jarkolektoj de la bulteno estis 2 A4-formataj folioj, kunkrampitaj ĉe unu angulo. Per kaŭĉuka stampilo Bob aldonis antaŭ la titolon, verdan stelon kun kanguruo en la

mezo, kaj “Distribuata senkoste al la membroj” – staris sub ĝi. Tio validas ĝis nun.



Bob kun balalajko


El la maja-junia numero de la 3-a jarkolekto (1984) ni ekscias, ke kunveno okazis en infanvartejo.

Oni multe diskutis pri gramatiko. George Clarke iĝis kasisto de la grupo.

En 1991 aperas kiel “editor” la nomo Peter Bird, en marto 1992 anstataŭita de Charles Stevenson.

Komplete anglalingva estas la juna numero de 1992, redaktita de Max Wearing. Sub titolo “Extraordinary issue” en ĝi estas anoncite, ke oni atendas la viziton de la ĝenerala direktoro de UEA, decidonta pri okazigo de onta UK en Adelajdo.

La aŭgustan numeron de la sama jarkolekto redaktis jam refoje Bob, ĝi kaj la kelkaj sekvaj estas jam du-lingvaj, Esperanto-anglaj. Ili enhavas inter alie krucenigmon, desegnitajn ŝercojn, poemojn kaj estas multobligitaj fotokopie.



Bob ĉe Strathalbyn

En 1993 ekzistis en Adelajdo nur 1 klubo. En *Tamen Plu* aperas nomoj kiel Astrid Riesen, Irene Cuffe, Rochelle Jacquier, Tadeusz Wybraniec,

Zbigniew Wybraniec, Peter Bird, Noni Walsh, Pat Nunn, Brian Hancock, Ros Jackson, Ilse Blicavs, Owen Franklin, Colin Giles, Barbara Kwiatek. Oni renkontiĝadis en lokoj kiel indonezia restoracio, framasona klubo, domo de kvakeroj.

Por 1993 oni elektis kiel prezidanton Margaret Furness-on. Inter la programoj de tiu jaro estis prezentado de kuirado. Bob kaj Audrey instruis la samideanojn pri vegetarana kuirarto.

Samjare ekaperas (kaj daŭre estas) en *Tamen Plu* ŝercoj. “Mi trovis iun ŝerclibron kaj komencis traduki el ĝi en Esperanton” — klarigas la redaktoro, kiu evidente ege ĝuas ĉi-taskon.

En la novembra eldono de la sama, 13-a jarkolekto, aperas interesa informo: “AEA pagis \$600 por montri Esperanto-ekspozicion en la ekspoziciejo de la Adelajda kongresejo en Norda Teraso. Preparis ĝin Gerald kaj Ruth Tumman en Melburno.”

La novembra numero de 1995 estas unu A4-paĝa. Ni legas: “Temporary editor Margaret Furness”.

Aprilo 1996: prezidanto iĝis Brendan Linnane. Max Wearing trovis novan lokon por renkontiĝi: Proscenio en Blyth strato. Al la “nigra truo”, kiel la esperantistoj nomis la lokon, oni venadis pli ol unu jaron.

En 1997 la grupo renkontiĝadas denove en la kvakerejo. Tiam Brendan Linnane ne nur prezidas, sed ankaŭ redaktas *Tamen plu*-on. Tiu jaro estas la jaro de la UK en Adelajdo. En la marta bulteno aperas listo de membroj de la Landa Kongreskomitato de la UK, inter ili Max Wearing kaj Brendan Linnane kiel vicprezidantoj. Maje aperas la pli ol 2-paĝa ra-

porto de LKK-prezidanto Kep Enderby.

La aŭgustan numeron de 1998 redaktas ree Bob. Samloke aperas la informo, ke la “Sudaŭstralia Esperanto-Esperanto-Societo” ŝanĝas sian nomon al “Esperanto Sudaŭstralio”. Ŝanĝita estas ankaŭ la statuto kaj “ekde la 16-a de julio 1998 ni estas leĝe registritaj”. Aldonindas, ke pliboniĝis la grafika flanko de la bulteno, Bob ekuzis novan komputilan programon.



Bob manĝas patkukon

La esperantistoj dividiĝis je diversaj grupoj. Sub la gvidado de Owen Franklin iuj kunvenadis ĉiun mardon en la kaftrinkejo de la civitisma centro de Charles Sturt; ankaŭ marde, en la Ŝtata Biblioteko, sub la gvido de Max Wearing oni studis *Paŝoj al plena posedo*, merkredvespere estis kunveno en la biblioteko de West Torrens, alia grupo iradis al la ejo en Tynte strato.

Ĉefe je instigo de Sandor Horvath la adelajdanoj ekorganizis vintran kursaron. La raporto pri la dua tia aranĝo, okazinta en Hackham — elementa lernejo, aperis en la julia eldono de *Tamen Plu* en 2006. La biografioj de 11 el la klubanoj, prezentitaj dum la klubaj kunvenoj, aperadis sur la paĝoj de la bulteno inter aŭgusto 2005 kaj novembro 2006. Ili estis represitaj en la tut-

landa revuo *Esperanto sub la Suda Kruco*.



Bob en Danlando

La ĝis nun lastaj numeroj de *Tamen Plu* estis senditaj-transdonitaj en papera formo al 20 unuopuloj, sed per la reto al pli ol 100 esperantistoj aŭ esperantaj instancoj ne nur Aŭstraliaj. Do, malgraŭ stumbloj kaj gratoj, hezitoj, duboj, malakordoj — ni, kaj kune kun ni ankaŭ la bulteno, tamen iras pluen.

Bob estas rapida, la aktuala numero de *Tamen Plu* pretas jam en la antaŭa monato. La redaktoro mem distribuas ĝin, transdonante ĝin al la esperantistoj laŭeble persone. Eĉ se

dum la historio de la bulteno redaktoris ankaŭ kvin aliaj esperantistoj, la plejparto de ĝi, certe almenaŭ 22 jar-kolektoj, venis el la “plumo” de Bob. Tiu, kiu iam redaktis ion, scias, ke necesas multe da tempo por kolekti, skribi, redakti, kopii, distribui... Kaj temas ne nur pri la uzitaj horoj kaj energio, sed precipe pri la volo, pri la intereso, eĉ amo al la laboro. Tion ĉion Bob donacis al ni silente, sen fanfaronado aŭ postulo pri pago. Ni deziru al li firman sanon kaj multan energion, ke li ankoraŭ longe povu “Tamen plui” je ĉies utilo kaj kontento.

Bob, koran dankon al vi pro la farita laboro! [el *Tamen Plu* julio 2007, iom reviziita de Katja Steele] □

Internacia Fotokonkurso de la gazeto *La Ondo de Esperanto*

La redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la deka Internacia Fotokonkurso. En la fotokonkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume 5 fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kalininograd, ab. ja. 1205, Ruslando). La fotoj devos atingi la sekretariojn antaŭ la 1-a de decembro de 2007.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta

koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, vera nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2008.
2. 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2008.
3. abono de *La Ondo de Esperanto* en 2008.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto*) por la plej bona foto pri la temo *Festoj*.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en *La Ondo de Esperanto*. La organizanto de la kon-

kurso havos ĝis la 31-a de decembro en 2009 ekskluzivan rajton uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektromatika formo kaj en ekspozicioj. Poste

la publikigo-rajton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

Halina Gorecka
sekretario, sezonoj@kanet.ru



Konkurso por nomi la AEA Bibliotekon Contest for Naming the AEA Library raportas Barrie Cledsmith

Here are the results of the question posed in the May-June issue of *ESK*. About 100 names were suggested, from which the Contest Committee has chosen the 7 most appropriate.

Please choose your preference and send it to: <biblioteko@esperanto.org.au>, or telephone (03) 9534 3254 by the 5th December. You can also write to: Barrie Cledsmith, Biblioteka Komisiono, Aŭstralia Esperanto -Asocio, 2/56 Carlisle Street, St Kilda Vic 3182.

We will announce the official name and the winner of the prize in the January-February issue of *ESK*.

1. Australian Esperanto Collection / Aŭstralia Esperanto-Kolekto
2. Australian Esperanto Treasures / Aŭstralia Esperanta Trezoro
3. Esperanto Collection of Australia / Esperanto-Kolekto de Aŭstralio
4. Esperanto Library of Aŭstralia / Esperanto-Biblioteko de Aŭstralio
5. Esperanto Peace Museum / Esperanta Paco-Muzeo
6. Esperanto Treasures Museum / Esperanta Trezor-Muzeo
7. Ralph Harry Australian Esperanto Library / Aŭstralia Esperanto-Biblioteko Ralfhari

Explanatory notes.

It is good to have the name begin with the word Esperanto, which makes it easy to find e.g. in phone books. The advantage of using the description Museum is that the age of the exhibits then does not reflect on the modernity of the present-day movement. Collection is perhaps even better. Mentioning Peace offers some extra advantages e.g. when searching on the internet. It also publicises the purpose and philosophy of the language.

Jen rezultoj de la demando en la *ESK* de majo-junio. Oni sugestis ĉirkaŭ 100 nomojn, kaj la Konkursa Komitato selektis la 7 plej taŭgajn.

Bonvolu elekti vian preferatan nomon kaj sendu ĝin al: <biblioteko@esperanto.org.au>; aŭ telefonu (03) 9534 3254 antaŭ la 5a de decembro. Vi povos ankaŭ skribi al: Barrie Cledsmith, Biblioteka Komisiono, Aŭstralia Esperanto Asocio, 2/56 Carlisle Street, St Kilda Vic 3182

Ni anoncos la oficialan nomon kaj gajninton de la premio en la novembro-decembra numero de *ESK*.

Klarigaj rimarkoj.

Estas bone ke la nomo komenciĝu kun la vorto Esperanto, kiu faciligas la trovon, ekzemple en adresaro. La avantaĝo de la priskribo Muzeo estas tio, ke la aĝo de la elmontraĵoj tiame ne priprenigas malfavore la modernecon de la nuntempa movado. La vorto Kolekto estas eble eĉ pli bona. La mencio de Paco proponas iujn ekstrajn avantaĝojn, ekzemple kiam oni serĉas per Interreto. Ankaŭ ĝi diskonigas la intencon kaj filozofion de la lingvo.

Photos for *ESK* / Fotoj por *ESK*

Donald Broadribb

Many of our contributors now send photos to accompany their articles. These really make a difference, not just to the appearance of the magazine, but also to enjoyment when reading the articles.

Some of the photos print a great deal better than others. The most important reason for this is a mysterious something called *dpi*. *dpi* means “dots per inch”. If you look very carefully at a computer screen, you will notice that every picture is made up of a vast number of individual dots, called pixels. The dots are so tiny, and so close together, that usually you are not aware of them.

When a computer shows a colour picture, each colour is made by a combination of coloured pixels: cyan, magenta, and yellow pixels. For instance, the colour blueberry is composed of cyan and magenta dots placed side by side — not in equal amounts but a certain proportion of cyan colour with a different proportion of magenta. When we look at the picture, we don't see these as two separate colours but as blending together to make a single resultant colour.

Our computer screens make their colours with relatively few dots. In fact, 72 dots per inch (72 dpi) is enough to give a reasonable colour appearance for everyday purposes. Generally speaking, colour pictures you download from the Internet are 72 dpi.

Printing machines make their col-

Multaj el niaj kontribuantoj nun sendas fotojn por akompani siajn artikolojn. La bildoj vere pligrandigas ne nur la aspekton de la revuo sed ankaŭ la ĝuon kiam oni legas la artikolojn.

Kelkaj el la fotoj presiĝas multe pli bone ol aliaj. La plej grava kialo estas mistera kalkulo nomata *dpi*. *dpi* signifas “po ... punktoj en colo”. Se vi tre zorge rigardos komputilekranon, vi rimarkos ke ĉiu bildo konsistas el granda amaso da individuaj punktetoj, (teknike nomataj “rastumigiloj”). La punktetoj estas tiom kunpremitaj ke kutime oni ne rimarkas la individuajn.

Kiam komputilo montras koloran bildon, ĉiu koloro konsistas el kombino de koloraj punktetoj: cianaj, fuksinaj, kaj flavaj. Ekzemple, la koloro “blubera” konsistas el apudmetitaj punktetoj cianaj kaj fuksinaj — ne en egalaj kvantoj, sed certa proporco de ciana koloro kaj alia proporco de fuksina. Kiam ni rigardas la bildon, ne ne vidas du apartajn kolorojn, sed kunmiksaĵon kiu aspektas al ni kiel unusola koloro.

Niaj komputilekranoj kreas siajn kolorojn per relative malmultaj punktetoj. Efektive, po 72 en colo sufiĉas por fari akcepteblan koloraspekton por ordinaraj celoj. Ĝenerale, koloraj bildoj elŝutitaj per Interreto estas 72-dpi-aj.

Presiloj kreas siajn kolorbildojn laŭ iom malsimila metodo. Kio akcepteble aspektas per aŭ televida aŭ komputila ekrano je 72 dpi aspektas

in a somewhat different way. What looks acceptable on a TV or computer screen, at 72dpi, looks rather miserable when printed: the dots show up as separate dots. In technical terms this is called “pixelation”. For an acceptable looking printed picture, 300 dots per inch (300 dpi) is the minimum.

Look at the two pictures on the following page. They are both scans of the same photograph, which in turn is typical of the quality of the average photo submitted for *ESK*. The photograph was taken with a film camera, and then scanned with a Canon LIDE 35 scanner. The upper picture was scanned at 72dpi; the lower picture was scanned at 300dpi.

When you take a photo with a *digital* camera and transfer the photo into your computer, you will find that you have a choice as to what quality computer picture you want it to be. You can choose to set the quality of the computer picture at 72dpi, or 300dpi, or various other amounts of dpi.

If you use a film camera, in order to make a computer picture you have to scan a print of the picture using a scanner. In this case also, when you make your scan you can set the quality of the scan at 72dpi, or 300dpi, or some other amount of dpi.

The 72dpi computer picture will not take very much computer memory, and it will be very easy to send as an email attachment. The 300dpi picture will take a lot of computer memory, but you can still send it as an email attachment. If you choose to send only a 72dpi picture to accompany your article, you should realise that the picture will not look great. If you decide to send a 300dpi picture, it

mise kiam oni presas ĝin: oni vidas la apartajn punktetojn. Teknike oni nomas tion “rastrumaspekto”. Por akceptebla aspektanta presita bildo, 300 dpi estas minimumo.

Ekzameni la du bildojn sur la sekva paĝo. Ambaŭ estis skanitaj laŭ unusola foto, kiu siavice havis la kvaliton de la fotoj transsendataj al *ESK*. La foton oni faris per filmofotilo, kaj poste skanis per skanilo Canon LIDE 35. La supra bildo estas skanaĵo je 72 dpi; la malsupra bildo estis skanita je 300 dpi.

Kiam oni fotas per *diĝita* fotilo kaj transmetas la bildon en komputilon, oni trovas ke oni povas elekti la kvaliton de la celata komputila bildo. Oni povas elekti kvaliton de 72 dpi, aŭ de 300 dpi, aŭ diversaj aliaj dpi-mezuroj.

Kiam oni uzas filmofotilon, por fari komputilan bildon necesas skani pozitivon de la foto, per skanilo. Ankaŭ farante la skanon, oni povas elekti la kvaliton, ĉu 72-dpi-an, ĉu 300-dpi-an, aŭ alian dpi-mezuron.

La komputila bildo je 72 dpi uzas malmulte da komputomemoro, kaj oni povas tre facile sendi ĝin kiel alligaĵon al eposta komunikaĵo. La bildo je 300 dpi uzas **multe** da komputomemoro, sed malgraŭ tio oni povas facile sendi ĝin kiel alligaĵon al eposta komunikaĵo. Se vi decidis sendi 72-dpi-an bildon por akompani vian artikolon, vi bezonas scii ke la bildo ne bele presiĝos. Se vi decidis sendi 300-dpi-an bildon, la presita bildo aspektos rimarkinde pli bele.

Do bonvolu sendi por aperigo en *ESK* nur 300-dpi-ajn bildojn — por bonaspekta presiĝo.

will look enormously better, when the article is printed. So send 300 dpi pictures for printing in *ESK*, please.



72dpi:
via redak-
toro rigar-
danta
marŝadon
de
procesiaj
raŭpoj



300dpi:
via redak-
toro rigar-
danta
marŝadon
de
procesiaj
raŭpoj

Komparo: foto je 72dpi kaj je 300dpi

Rimarku ke, presite per presmaŝino, la foto multe pli bone aspektas pro sia skaniĝo je 300 dpi, anstataŭ per la malaltkvalita 72-dpi-a sistemo. Sur via ekrano la bildo 72-dpi-a aspektas kontentige. Sed presite per presmaŝino, 300-dpi-a bildo (aŭ eĉ pli ol 300-dpi) multe pli kontentigas.



• Konu viajn kungesamideanojn Know Your Fellow Esperantists

Ann Gash
1922-2006

Merkredon 24an de Majo 2006 Ann Gash, kiu kiel avinjo kaj sola je la aĝo de 55 ĉirkaŭiris la mondon per ligna velŝipeto, forpasis je la aĝo de 84 jaroj.

Ann estis longtempa ano de la Manlia Esperanto-grupo kaj aktiva ĝis la 1980a jardeko. Krom Esperanto Ann ankaŭ lernis ludi fluton ĉe la klubo kun grupo gvidata de Peg Ford Lewis. En 1975 Marjorie Duncan ricevis leteron de Ann kiu tiam estis ĉe Christmas Island. Ann skribis, ke ŝi veladas al Eŭropo por partopreni en la “Piper’s Guild Summer School” en Svislando. Dum la vojaĝo ŝi plulernis Esperanton kaj en Francujo ŝi velis laŭ la riveroj vizitante Esperantistojn en Leon.

Post sia reveno al Sidnejo en 1977 Ann verkis libron *A Star to Steer Her By*. Ekzemplero de la libro estas en la biblioteko de la Manlia Esperanto-klubo.

Ann estis entuziasma ludanto de Skrablo. En 2001 ŝi estis listigita kiel 500a en Aŭstralio.

El ABC-intervjuo kun komponisto Nigel Westlake, en kiu li parolas pri Ann Gash:

Nigel Westlake: He [my father] took his long service leave just when I left school and invited the family on this six month trip on a 32 foot yacht and I would have to say it was a truly amazing and unique experi-

ence for a kid of that age to embark upon. And basically lived off fish and coconuts for about six months and living in that situation where we were living on top of each other for months on end was a great thing. We met so many great people, people who were taking a break from the rat race or leaving it altogether and just embarking on sailing trips around the world.

Peter Thompson: The sailing grandmother!

Nigel Westlake: Yes, Ann Gash. We got invited aboard this 28 foot folkboat from Cairns harbour by this elderly lady on her own and she asked us aboard and put the kettle on and we started talking and we said “Where are you off to?” thinking she wouldn’t be off to anywhere because how could someone of that age sail and she said “Oh, I’m off to Scotland” and she was an amateur piper, a Scottish piper and couldn’t afford the airfare so she decided to sail to Scotand and we thought that she was completely mad and I remember my dad saying “How’s your navigation?” and she said “Oh, I’ve got a good book, I haven’t really starting reading it yet” and we thought she was completely loony and we got back to Sydney and a year or so later read about the return to Sydney Harbour.

Bonan Ŝancon ĉe Radio 3ZZZ

de Jennifer Bishop

En 1989 nia kara fondinto de la Esperanto-Radioprogramo, Svetislav Kanaĉki, havis la bonan ŝancon informiĝi pri la nova multkultura radiostacio 3ZZZ kaj ricevi la helpon de Juristo Kep Enderby por certigi ke Esperanto estu akceptita por programo de 30 minutoj.

Kiam mi ĉeestis mian unuan kunvenon de Esperanto-Federacio de Viktorio post alveni en Aŭstralio en 1992, bonŝance mi renkontis Svetislavon, kiu invitis min kunlabori ĉe la Esperanto-Radioprogramo, kaj mi entuziasme akceptis, kvankam mi ne antaŭvidis labori en kvazaŭŝranko sub la ŝtuparo de Trades Hall, Melbourne. Post nelonge 3ZZZ kun financa helpo de la nacia registaro havis la bonan ŝancon translokiĝi al ĝia nuna pozicio en la unua etaĝo de impona konstruaĵo.

Pro la subvencioj de la nacia registaro, bonŝance eblis plilongigi la programon al unu horo, kaj mi estis bonŝanca ricevi trejnadon pri funkciado de la panelo kaj diskoturniloj, kaj ricevi atestilon. Tio estis bonŝanca ankaŭ por Svetislav, ĉar li povis dividi la laboron kaj koncentriĝi pri registrado de la programo por la arkivoj, pro kio vi nun estas bonŝancaj havi la eblon aŭskulti ĉiujn programojn ĉe <http://www.3ZZZ.com.au> kaj ĉe la arkivo <http://www.melburno.or>

[g.au](http://www.3ZZZ.com.au).

Bonŝanco sekvas la programon, ĉar ĝi ne nur daŭras unu tutan horon, lundon je 13.00, kie ni nun havas kvar studiojn por programoj de pli ol 70 diversaj kulturaj grupoj, komputilojn, plurajn oficejojn kaj oficistojn, bonvenigan akceptejon, preparejon, kuirejon kaj valoran kunvenejon, sed la nuna Esperanto-teamo konsistas el 6 sindediĉantaj kunlaborantoj kiuj certigas ke ĉiusemajne aŭskulteblas freŝa programo. Bedaŭrinde la nacia registaro kurtigis la subvencion ĝis triono, sed per almenaŭ 40 pagantaj membroj kaj kolektado de \$1000 dum “Radiotono” ni rajtas daŭrigi la programon. Nia tasko nun estas certigi la membraron kaj kolekti monon. — Jen per membriĝo vi havas la eblon ne nur ĝui la Esperanto-programon aŭdeblan tra la tuta mondo, sed havi plian bonan ŝancon por gajno de valora premio dum Radiotono.

Elkore la teamo petas vin aŭ refoje pagi la kotizon, aŭ aliĝi por certigi la daŭrigon de la programo, kaj aĉetu tombolbiletojn por Radiotono en oktobro.

Se vi volas pli da informo, via mesaĝo estos tre bonvena ĉe <stevskank@hotmail.com> kaj via letero ĉe Esperanto Program 3ZZZ, PO Box 1106, Collingwood, Vic 3066. □



Por Ridigi Vin

Nokte venis el gastejo ebrulo kaj demandis fremdulon irantan sur la strato, ĉu tio estas la suno aŭ la luno, kiu lumas sur la ĉielo. La fremdulo diris: “Pardonu, sinjoro, mi ĉi tie mem estas fremda.”

[el *La suda kruco* aŭgusto 1925]

Novaj membroj informas Stephen Pitney

La AEA kore bonvenigas la ĉisubajn novajn membrojn al nia asocio.

NSK: Geoff Curthoys, Nicholas Sheppard, Beth Wade-Ferrell, Donald Maclurcan, Thora Thomas, Dominic Fitzsimmons, Frimpong Ampomah Badu, Dominic Fitzsimmons, Kevin Warburton, Jonathan Moylan, Glenn R. Peberdy

SA: Pat Palmer, Dan Ehler

Tas: James Dwyer, Phie Yong Goh
Qld: Steven Dalton, Eleanor Perno, Brian OMeara

Vic: Richard Penman, Andrew Soos, David Casey, Melbourne Esperanto Kafa Klubo, Torquay Esperanto Kafa Klubo

WA: Philip Nichols

Eksterlanda: (Nova Dumviva Membro): Frank Stephan.

.....

Frank Stephan naskiĝis en Germanujo kaj studis ĉe la Teknika Altlernejo de Karlsruhe komputilsiencon kaj matematikon. Tie li ankaŭ lernis en kursoj du novajn lingvojn, la japanan kaj Esperanton. Li partoprenis en Esperanto-kurso ĉar amiko de li faris la samon; sed ĉar Esperanto estis ege pli facila ol la Japana lingvo, Frank ŝatis tion kaj post kelkaj jaroj povis uzi Esperanton ja sama nivelo kiel la gepatra germana lingvo aŭ la angla lingvo. Frank eldonis dum kelkaj jaroj la Esperanto-gazeton de la regiono de Karlsruhe kaj Heidelberg. Pro scienca kunlaboro Frank venis al Aŭstralio ekde 1996 ĉiujare al la Universitato de NSW en Kensington apud Sidnejo. En 2003 li elmigris al Sidnejo kaj akceptis unu-jaran postenon ĉe la universitato, do Aŭstralio iĝis lia dua hejmlando post Germanujo. Dum siaj vizitoj al Sidnejo kaj dum la posta loĝado en Aŭstralio, Frank ĝuis la gastamecon de la Esperantistoj en Nova Sud-Kimrujo kaj vizitis regule la Esperanto-renkontiĝojn en Redfern.

Surprizo estis ke li tie renkontiĝis kun Volo Gueltling, kiu estas la filo de la Esperantisto Adolph Gueltling el

Karlsruhe.

Volo montris al Frank dum multaj aŭtovojaĝoj la ĉirkaŭaĵon de Sidnejo. Aliaj Esperanto-amikoj estas Ĝo kaj Alan Turvey kiuj ankaŭ estis vizitintaj Frankon en Heidelberg en Germanujo antaŭ la elmigro.

Bedaŭrinde ne estis dumviva posteno en Sidnejo por Frank. Do la kolegoj tie aranĝis ke Frank povis posteni en Singapuro, kiu iĝis lia tria hejmlando en 2004. Tamen Frank daŭrigas la sciancan kunlaboron kun la Sidnejanaroj per regulaj sciencaj vizitoj kaj ankaŭ revidas la samideanojn en Redfern dum tiuj vizitoj. Frank iĝis nun dumviva membro al AEA, kiel dankon pro sia akcepto en Aŭstralio; li ankaŭ esperas plibonigi siajn ligojn al Aŭstralio kaj revidi la landon ofte dum la venontaj jaroj.

Frank Stephan, 105 Clementi Road, Block B#04-04, Singapore 129789, Republic of Singapore;
<fstephan@comp.nus.edu.sg> □

Artikoloj dezirataj

ENK ĉiam bonvenigas artikolojn. Se vi havas verkon aŭ verketon, nepre sendu ĝin al ni por ebla aperigo. □

La oceania migrado de la maorioj de Brian Fox

La maorioj estas la indiĝena gento de Novzelando. Ili migris tien el Polinezio per grandegaj vojaĝ-pirogoj aŭ *pahioj*.



Maoria pirogo

La fama maoria antropologo, Te Rangi Hiroa, nomis la polinezianojn: “La Vikingoj de la Sunleviĝo”. Ili esploris Pacifikan Oceanon jam trimil jarojn antaŭ ol la eŭropaj vikingoj vojaĝis al Ameriko. Ili trovis ĉiun insulon en Pacifiko. La plej lasta kaj plej granda insularo kiun ili malkovris, estas Novzelando, kie tiuj polinezianoj fariĝis la maorioj, la unuaj homoj kiuj setlis en tiu lando.

Origino en Azio

La antikvaj prapatroj de la maorioj loĝis en sudorienta Azio antaŭ kvinmil jaroj. La lingvo, la kulturo, kaj la genoj de la maorioj parenkas al tiuj de homoj en montaj minoritatoj kiuj ankoraŭ vivas en sudorienta Azio.

Antaŭ kvinmil jaroj parto de tiu antikva gento veturis trans Sudĉina Maro al la etaj insuloj inter Filipinoj kaj Indonezio. Ili kunportis el Azio al la nova hejmo multajn plantojn kaj kelkajn bestojn kiujn ili bezonis. Por ekzemploj: la banana planto kiu ne havas semojn, panfrukta arbo, taro,

kalabaso, pandano; kokinoj, porkoj, hundoj.

Antaŭ kvarmil jaroj kelkaj el tiuj insulanoj migris orienten laŭ la norda marbordo de Novgvineo al Salomonoj. Tie ili disvolvis sian faman oceanan kulturon de navigado, esploro, koloniado kaj adaptiĝo.

La kutimo de triboj ĉie estas ke anoj de iu klano loĝas en unu loko, ĝardenas en dua, ĉaskaptas en tria, kolektas fruktojn kaj lignon en aliaj lokoj. Ili marŝas inter la lokoj, kaj ili portas ĉion sur la ŝultro, la dorso, kaj la kapo. Tamen la polinezianoj sur insularoj veturis inter apartaj insuloj por apartaj agadoj. Pli grave ili portis sin kaj ĉion sur boatoj, do longaj distancoj ne estas problemo por portado de pezaj aĵoj.

Dum la sekva jarmilo kelkaj el la insulanoj migris sudorienten per boatoj, de insulo al insulo laŭ Salomonoj kaj laŭ Vanuatuoj ĝis Novkaledonio. Ili lernis konstrui la grandajn duoblajn disvolvitajn vojaĝ-pirogojn (*pahiojn*), kaj esploris orienten mil kilometrojn trans Pacifika Oceano, kontraŭ la vento, kaj malkovris Fiĝiojn, kie kelkaj el ili setlis kun siaj plantoj kaj bestoj.

Polinezio

Tiuj el la gento kiuj restis sur la insuloj inter Filipinoj kaj Fiĝioj fariĝis la melanezianoj, kaj tiuj kiuj plu migris orienten al centra Pacifiko fariĝis la polinezianoj.

Skribu linion de Novzelando dek-mil kilometrojn al Havajo; de Havajo dek-mil kilometrojn al Paskinsulo; kaj

de tie dekmil kilometrojn reen al Novzelando. Jen la polinezia triangulo, dekono de la terglobo, kun miloj da insuloj.

Kiam la esploristoj frontis al la vasta maro, ili sciis ke ili povos pli facile reveturi hejmen se ili esploras kontraŭ la vento. Tiel ili progresis trans la oceano.

Arkeologio montras ke la polinezianoj grade esploris orienten sude de la ekvatoro. Ili observis migrantajn birdojn kiuj flugis trans la vastecon de la oceano. Ili trovis flosantaĵojn sur la akvo. Ili lernis legi la nubojn kaj la ondojn de la maro. Ili studis la poziciojn kaj moviĝojn de la steloj, kaj uzis tiun lerton por navigi trans Pacifikon.

Migrada Kulturo

La polinezianoj montris scivolemon pri kio ekzistas trans la oceano. Ili atingis la insulojn Tongo kaj Samoo antaŭ trimil jaroj. Ili setlis en Kuk-Insularo, Societ-Insularo, kaj Markizoj, en la mezo de Pacifiko, antaŭ dumil jaroj. Ili fondis kolonion sur Pask-insulo en la fora oriento antaŭ 1500 jaroj. Verŝajne ili vojaĝis pli orienten al Sudameriko, ĉar la DNA montras ke polinezianoj portis sian pacifikan kokinon al Sudameriko, kaj ili raportis la amerikan bataton al Pacifiko, kie ĝi fariĝis grava radika legomo.

En Markizoj ili vidis la migradon de la birdo *ora pluvio*, al la nordokcidento. Ili esploris tien, trans 3000 kilometroj da maro, kaj malkovris Havajon, kaj antaŭ 1200 jaroj ili setlis tie. La polinezia formo de la nomo *Hawai`i*, ankaŭ troviĝas en la formo *Savai`i* en Samoo, kaj *Havai`i* en aliaj insuloj, kaj *Hawaiki* en Novzelando. Ĝi signifas “hejmo” aŭ “ori-

gina loĝejo”.

En Tahitio oni ankaŭ atentis la migradon de la longvosta kukolo al la sudokcidento. Tien ili sentime esploris trans 4000 kilometrojn da oceano, kiu estas sen aliaj insuloj, kaj malkovris Novzelandon. Antaŭ 900 jaroj grupo de polinezianoj vojaĝis kun plantoj kaj bestoj trans tiujn 4000 kilometrojn da maro por setli en Novzelando.

En Sudĉina Maro la gento jam sciis fari ceramikon kaj pafarkojn, kaj portis tiujn metiojn al Pacifiko. Sed sur la vulkanaj insuloj kaj koralaj insuletoj de Polinezio, mankis bona argilo kaj taŭga ligno por daŭrigi tian lerton, do ili perdis la eblon kaj la konon.

Metaloj mankis en Pacifiko, sed de loko al loko troviĝis la vulkana vitro, obsidiano, el kiu ili splitis tranĉilojn. En Novzelando troviĝas jado, el kiu ili formis hakilojn.

Novzelando

La pacifika rato, *kiore*, alvenis en Novzelando antaŭ dumil jaroj, laŭ dato per radiokarbono-14 en fosilioj, do ni supozas ke polinezianoj vizitis la landon en tiu tempo, sed arkeologio indikas ke homoj ekloĝis en Novzelando antaŭ nur 900 jaroj. Kaj viroj kaj virinoj sentime entreprenis la longan danĝeran vojaĝon. Ili kunportis hundojn kaj plurajn plantojn, do oni estas certa ke ili celis fari kolonion tie.

Kredeble ili provis kunporti porkojn kaj kokinojn, sed vojaĝo trans 4000 kilometrojn daŭras du monatojn, kaj tiuj bestoj ne travivis la malvarmajn noktojn sur la ofte ŝtorma suda oceano. La batato kaj taro, kiujn ili kunportis, postvivis kaj rolis kiel

ĉefaj legomoj en Novzelando. Kelkaj tropikaj plantoj vivis sed ne prosperis.

Tamen, dum la vojaĝo la homoj kaptis fiŝojn el la maro kaj akvon el la pluvo. En Novzelando ili trovis grandajn birdojn kaj maran mamulon, la otarion, por manĝi; do la cent setlantoj prosperis. La kolonio en la fora nordo rapide kreskis, kaj baldaŭ ili fondis aliajn koloniojn ĉirkaŭ la marbordo, ĉiam per boata migrado.

En Novzelando vivis granda struteca birdo, *moa*, la dinorno, alta je tri metroj, eĉ pli granda ol struto. La maorioj sekvis ĝin por ĉaskapti, kaj post cent jaroj ĝi fariĝis tiom grava parto de ilia nutraĵo, ke por la unua fojo en miloj da jaroj polinezia gento rigardis enlanden, anstataŭ maren, por plia migrado. Pro tio ke la dinorno fariĝis tiom esenca parto de la maoria manĝaĵaro, ĝi elmortiĝis post kelkaj jarcentoj.

La vivnivelo falis kaj okazis ekonomia krizo. Sed la polinezianoj jam estis adaptiva gento. La maorioj fariĝis eĉ pli ŝanĝiva. Ili fariĝis ĝardenistoj kaj plibonigis la grundon per aldonado de sablo kaj kompoŝto. La batato estis la ĉefa nutraĵo, kun fiŝoj, moluskoj, kaj filikradikoj. Ĉiu klano havis siajn lokojn por ĝardenado kaj fiŝkaptado, kaj la tribo de tiuj klanoj pretis protekti ilin kontraŭ aliaj triboj.

Triboj kaj Klanoj

Jam en Polinezio ekzistis la tri gravaj konceptoj: *mana*, *tapu*, kaj *utu*, tio estas: prestiĝo, sankteco, kaj rekompenco. Nun tiuj tri konceptoj fariĝis severaj. Oni gardis la *mana*, prestiĝon, de la klano kaj ĝia ĉefo. Se iu profanis la *tapu*, la sanktecon, de la

ĉefo aŭ mortintoj, la klano postulis *utu*, rekompencon, aŭ ili venĝos la insulton. Pro tio, kaj pro la protekto de nutraĵo, militoj inter triboj okazis.

Ekzistis nek pafiloj nek pafarkoj. Militoj estis per klaboroj kaj bastonoj. En tuta milito eble dek personoj mortus. Se alia tribo atakos oni prenis ĉiun legomon el la ĝardeno kaj portis ĉion al la fortikaĵo por ke la atakantoj ne povu provizi sin el la ĝardeno dum ili sieĝis la vilaĝon.

La socia organizo fariĝis pli strikta; la kastoj en la socio fariĝis pli apartaj; kaj ĉefeco nun fariĝis hereda. La bazaj eroj de la socio estis: familio, klano, tribo, kaj "pirogo". Tiu lasta, la tribaro, kredis migradon el sia Hawaiki, la antaŭa hejmo, per la sama *pahio* aŭ vojaĝ-pirogo.

La labortaskoj de viroj kaj virinoj estis apartaj, ekzemple: viroj fiŝkaptis, virinoj plektis; sed la valoroj de la taskoj estis egalaj. Kiam alia tribo vizitis, nur virinoj faris la bonvenigan krion, kaj dum la disputado nur viroj sidis ĉe la antaŭo, okaze ke batalo eruptus.

La plej ofta aĝo por morto estis inter tridek kaj kvardek jaraĝa. Ili afable traktis la gefilojn, sed eble kvarono mortis dum infaneco. Ĉi tiu statistiko estas iomete pli bona ol en mezepoka Eŭropo kaj mezepoka Azio.

Oni ofte rimarkas la diferencojn inter la aŭstraliaj aborigenoj kaj la novzelandaj maorioj. La aborigenoj disvolvis rigidan senŝanĝan kulturon, ĉar nur tiel ili povis travivi en lokoj sen multaj akvo kaj nutraĵo. Kontraste, la maorioj disvolvis ŝanĝeman kulturon, ĉar nur tiel ili povis adaptiĝi al ŝanĝiĝemaj cirkonstancoj.

Eŭropaj Ŝipoj Vizitas

En la somero, decembro, 1642 maorioj en Sudinsulo vidis strangan larĝegan *pahion* aŭ vojaĝ-pirogon kun grandaj blankaj veloj. Kanuoj pagajis al tiu nederlanda ŝipo kaj donis la kutiman ceremonian defion, *wero*, ĉu la fremduloj venas milite aŭ pace. Anstataŭ la atendata respondo, la ŝipanoj sonigis trumpeton kaj parolis per stranga lingvo. Neniu flanko komprenis la kulturon de la alia flanko. La maorioj timis atakon el Nordinsulo. Militpirogo rapidis al la ŝipo kaj frakasis la nederlandan remboaton kaj kvar el la nederlandanoj mortis. La ŝipo forvelis kaj Eŭropo ne revenis dum pli ol jarcento.



En Tahitio ties polinezianoj renkontis britan ŝipon kiu restis tie dum kelka tempo por observi la transpason de planedo trans la sunon. La tahitia tradicia pastro Tupaia, forvojaĝis kun la ŝipestro, James Cook, por lia esploro de Sudpacifiko. En la printempo de oktobro 1769 maorioj en Nordinsulo vidis la ŝipon.

Por la maorioj ĝi estis la ŝipo de Tupaia, ĉar li rolis kiel peranto inter la britoj kaj maorioj. Li parolis dialekton de ilia lingvo, kaj kompreneble li sciis pri *wero*, *mana*, kaj *tapu*. Por la britaj maristoj Tupaia helpis eviti la pli danĝerajn mispaŝojn de la nederlandanoj. La ŝipo navigis ĉirkaŭ

ambaŭ insuloj kaj renkontis multajn maoriajn vilaĝojn.

Tuj poste ŝipoj el Eŭropo kaj Usono vizitis Novzelandon por kapti balenojn kaj otariojn, kaj por komerci kun maorioj por kaŭriaj arboj por pli rektaj mastoj, kaj por formia fibro por pli fortikaj ŝnuroj. Konfliktoj eruptis inter ŝipoj kaj triboj. Do, maorioj deziris pafilojn por fariĝi egalaj.

Post la fondiĝo de la brita kolonio Novsudkimrio, maoriaj ĉefidoj ne nur vizitis Aŭstralion sed eĉ restis kaj laboris en Sidnejo por lerni pri la kultivado de eŭropaj legomoj (ekzemple terpomoj) kaj pri la kreskigo de tritiko kaj muelado de faruno. Ili invitis kristanajn misiistojn al sia klano por instrui ilin pri la eŭropaj metioj plus religio, kaj pri konstruado de mueloj kaj ŝipoj.

Triba Musket-Militado

Sekve la maorioj mem konstruis ŝipojn kaj komercis kun Sidnejo. Ili vendis formian fibron, kaj aĉetis ŝtalaĵajn hakilojn kaj pafilojn. En 1830 Sidnejo aĉetis 840 tunojn da formia fibro de maorioj. Sed en la sama jaro la doganistoj en Sidnejo kaptis maorian ŝipon ĉar ĝi ne portis flagon. La maorioj vigle protestis. Do, Novsudkimrio proponis kaj desegnis flagon por la maorioj.

Triba militado per kluboj estis kiel futbalaj huliganoj en Anglio. Sed per muskedoj ĝi fariĝis kiel la masakroj de Unua Mondmilito. En 1820 la nordaj triboj havis po muskedo por ĉiu batalisto. Kaj nun kun porkoj kaj terpomoj ili havis ekstran nutraĵon. Ili ŝarĝis la pirogojn, pagajis suden kaj atakis la tradiciajn malamikojn. Tiuj fuĝis pli suden kaj atakis siajn malamikojn. Dum la dek jaroj inter 1820

kaj 1830 ĉirkaŭ 20,000 personoj mortis. Tio estis terura tragedio; unu persono el kvin perdiĝis.

Finfine la tuta stulteco de kontinua militado evidentiĝis kaj oni turnis sin al industrio. La fina triba masakro estis fare de klano el Nordinsulo en 1835, kiu atakis la tribon Moriori, kiu vivis laŭ sia paca kulturo sur Ĉathaminsulo for je 700 kilometroj sudoriente de Nordinsulo.

Kelkaj maoriaj triboj en la fora nordo de Novzelando kuniĝis en 1833 kaj nomis sin Unuiĝintaj Triboj de Novzelando, kun tiu ŝipflago. La brita registaro en 1833 sendis ambasadoron, James Busby, por deĵori en Novzelando por plibonigi rilatojn, kaj por bridu la britojn tie. Tiutempe ekzistis tri specoj de eŭropanoj en Novzelando: 1: Kristanaj misiistoj; 2: Komerclistoj; 3: Fuĝintoj el ŝipoj kaj el la punkolonioj en Aŭstralio, kiuj aliĝis al maoriaj familioj. La urbeto Kororareka en la nordo nomiĝis La Infero de Pacifiko, kaj la misiistoj deziris britan regadon. Tamen, la komercistoj ŝatis potencon por si mem. Kaj la fuĝintoj preferis maorian aŭtonomion.



Moderna pentraĵo de la subskribado de la traktato de Waitangi

Traktato de Waitangi

Busby luktis por traktato inter Britio kaj maoriaj ĉefoj. Sed la afero fariĝis urĝa kiam kompanioj en Britio kaj

Francio jam akiris terpecojn en Novzelando, kaj jam sendis ŝipojn kun setlontoj al Novzelando: angloj al Wellington, francoj al Akaroa, angloj al Christchurch, skotoj al Dunedin.

Brita armea ŝipo alvenis en Golfo de Insuloj, en la nordo, en januaro 1840, kun Kapitano Hobson, por diskuti kun maoriaj ĉefoj. Hobson petis al misiisto Williams ke li traduku la proponotan traktaton en la maorian lingvon. Williams ne tute regis la maorian lingvon, sed petis al sia filo, Edward, kiu parolis la vulgaran maorian lingvon. Ŝajnas ke Williams ne petis helpon de maorioj, el kiuj kelkaj bone kaj flue regis la anglan proloĝado en Sidnejo kaj ŝipveturo al Londono.

En 5 februaro 1840, oni prezentis tiun traktaton per la traduko de Williams al kunveno de maoriaj ĉefoj; multaj el Unuiĝintaj Triboj kaj kelkaj el aliaj klanoj kaj triboj. Okazis granda interdisputo; kelkaj kredis ke la traktato estas bona, kaj kelkaj kredis ke ili perdis sian sendependecon. Finfine laŭ ĝenerala konsento ili postulis plurajn ŝanĝojn al la proponita teksto. Hobson deklaris ke ili rekunvenos en 7 februaro, kaj intertempe Williams faros tradukon de la ŝanĝoj. Sed post la disiĝo la maoriaj gastigantoj konsciis ke ne ekzistas sufiĉa nutraĵo por ĉiuj gastoj por tiom da tempo, do Hobson decidis ke ili rekunvenos en la morgaŭo.

Kompatinda Williams devis traduki dum la nokto, sen bona vortaro, sen plena kono de la lingvo, kaj pli grave, li volis uzi molajn vortojn kiuj plaĉos al la ĉefoj. La rezulto estas ke la du versioj de la traktato, angla kaj maoria, ne estas tute samaj. Ili eĉ ne estas same longaj. Kaj tiuj terminoj

kiuj gravas en leĝoj kaj juro ne kongruis inter la du lingvoj. Parte tio spegulas la diferencojn en la konceptoj de la du kulturoj.

En miaj tradukoj en Esperanton, el ambaŭ lingvoj, de la tri artikoloj de tiu Fundamenta Dokumento de Novzelando, mi penis konservi la stilojn de la du originaloj.

Dividita Potenco

Britio starigis sian regurbon en la fora nordo kaj regis en la novaj urbetoj, kaj la ĉefoj ankoraŭ regis en siaj teritorioj. Estis unu militeto en la sudo pri tero, kaj dua en la nordo pri regado. Sed ĉiu flanko bezonis la alian por ekonomia progreso, kaj triboj vendis sufiĉan teritorion por allogi komercon.

Eŭropanoj venis. En 1860 ilia nombro egaligis al maorioj kaj la setlantoj deziris teron. Laŭ maoria tradicio la klano havas la uzrajton de la tero, kaj la tribo havas la posedrajton de la tero. Sed ĉu ĉefo rajtis vendi ĝin? Ĉu la pago apartenas al la ĉefo, al la klano, aŭ al la tribo? Kiel oni dividis la pagon? Kelkaj ĉefoj kaj kelkaj britaj agentoj perfidis kaj la maoriajn tribanojn kaj la britajn setlantojn. La tribanoj oponis vendadon. Militado inter triboj kaj la britoj kreskis kaj daŭris dum dudek jaroj. Tiu batalado nun nomiĝas la Novzelandaj Militoj.

La registaro konfiskis teritorion de triboj per armiloj. Nuntempe la registaro decidas kompensi al la triboj pro la forpreno. Sed iuj problemoj persistas: Kiuj estis la ĝustaj posedantoj? Kiuj ricevos la pagon? Kiel oni uzos la pagon aŭ dividos ĝin? Pluraj eŭropidoj komprenas nek la historion nek la procedon, kaj grumbblas kon-

traŭ la kompenso, sed plejparte ekzistas bonvolo.

De 1867 maorioj ekelektis anojn al la ĝenerala parlamento, sed ricevis nur kvar lokojn el sepdek. En 1879 estiĝis universala balotrajto. En 1893 virinoj gajnis la rajton voĉdoni. Tio inkluzivis maoriajn virinojn. Hodiaŭ duono el maorioj voĉdonas por la ĝeneralaj seĝoj kaj duono por la apartaj maoriaj seĝoj.

Sed en la moderna mondo, kiu ja estas maorio? Okazas tiom da geedziĝo inter la du gentoj ke ne plu restas purrasa maorio. Maorioj akceptas iun ajn personon kiu havas almenaŭ unu maorian prapatron, kaj tiel funkcias la juro en Novzelando. La tradiciaj rajtoj, ekzemple por fiŝkapti en rivero, ne ekzistas nur pro esti maorio, sed pro esti ido de la klano por kiu la Traktato de Waitangi “konfirmas kaj garantias” tiun fiŝejon.

Maoria Kulturo

Teorie Novzelando estis brita kolonio ekde 1840, sed vere tio nur grade realiĝis dum la tridek jaroj inter 1860 kaj 1890. Pro la longa daŭro de la evoluo el maoria potenco al eŭropida potenco la maoria kulturo postvivis sed la lingvo velkis dum la dudeka jarcento.

Post la perdo de tero, la ekonomia bazo de la maorioj falis. Konsekvence la vivrimedoj falis kaj sinestimo falis. Nuntempe maorioj, kiel laŭ statistiko ĉe ĉiu minoritato en la mondo, averaĝe: estas pli ofte laboristoj, havas pli da senlaboruloj, pli da krimoj, pli multe estas en karceroj, havas malpli altan edukadon, malpli altan sanstaton, malpli altan vivnivelon, malpli longan vivdaŭron, malaltan memrespekton. La situacio ne estas tiom malbona kiom en aliaj landoj,

kaj pliboniĝis dum la pasinta jardeko, sed la celo devas esti egaleco.

En la mezo de la dudeka jarcento okazis granda migrado al la urboj. Nun tri kvaronoj el maorioj loĝas en la grandaj urboj, kie la maoria lingvo plu velkis. Lastatempe ili konstruis maoriajn *marae*, t.e. tradiciajn renkontejojn, en la urboj. Ĉi tiuj efektive fondis novklanojn en la urboj, sed la tradiciaj triboj komence hezitis agnoski ilin.

Tamen la urbaj *marae* pli nombriĝis kaj daŭrigas la tradiciojn, kaj multon el la kulturo eĉ kvankam ofte per la angla lingvo. Ili kutime uzas la tradician ceremonion por bonvenigi vizitantojn. Por specialaj okazaĵoj roluloj vestas sin per la etnaj vestoj, kaj prezentas etnajn dancojn, kantojn kaj ĉantojn.

La Lingvo

En la sesdekaj jaroj kelkaj ŝtataj lernejoj komencis instrui la maorian lingvon. Nun multaj ofertas ĝin. Ĉiu universitato havas sian fakon pri maoriaj lingvo kaj antropologio, ĝis nivelo de magistrecio, kaj eĉ al doktor-ecio.

Dum la pasintaj tridek jaroj iuj *marae* fondis maorilingvajn antaŭlernejojn, nomatajn *kohanga reo*, laŭvorte: lingva nesto, en kiu geavoj estas la instruistoj kaj helpantoj. Ili parolas sole per la maoria lingvo, kaj la infanoj fariĝas kvazaŭ denaskaj parolantoj de la maoria.

Poste fondiĝis elementaj lernejoj kiuj instruas per la maoria lingvo, kaj nun altlernejoj. Kelkaj el la instru- libroj nepre estas en la angla, ekzemple pri kemio. Du el la studtemoj estas anglaj lingvo kaj literaturo.

La rezulto estas ke pli granda elcento de la novzelandaj loĝantaro nun

flue parolas la maorian lingvon ol antaŭ kvardek jaroj. Rilatoj inter la du gentoj, maorioj kaj eŭropidoj, nun estas multe pli bonaj ol ili estis en la pasinteco dum pli ol cent jaroj.

Difino de terminoj kiel ni uzis ilin ĉi tie

Klano: Parto de tribo; parenkaro kiu origine funkciis kiel ekonomia unuo. Maoria: *hapu*'

Tribo: Parto de gento, kun propra teritorio; kiuj pratempes estis ĉasistkollektistoj. Maoria: *iwi*.

Gento: Homgrupo kun samaj kulturo, lingvo, moroj, kiu prezentas socian koherecon.

Kanuo: Malgranda mallarĝa boato por malmultaj personoj kiun oni remas per pagajoj.

Pirogo: Boato el kavigita granda trunko; foje kun balanciero, foje duobla, foje unuopa. Maoria: *waka*.

Pahio: Grandega disvolvita duobla vojaĝ-pirogo kun transkovra ferdeko kaj kun veloj. Tahitia, havaja, maoria: *pahi*'

Marae: Maoria renkontejo; strikte: la korto por diskutado; moderne: la tereno kaj konstruaĵaro.

Traktato de Waitangi

tradukita de Brian Fox

Traduko de la angla versio:

Artikolo La Unua

La Ĉefoj de la Konfederacio de la Unuiĝintaj Triboj de Nov-Zelando, kaj la apartaj kaj sendependaj Ĉefoj kiuj ne fariĝis anoj de la Konfederacio, cedas al Ŝia Moŝto la Reĝino de Anglio, tute kaj sen reteno, ĉiujn rajtojn kaj potencojn de Suvereneco kiujn la menciita Konfederacio aŭ Indi-

viduaj Ĉefoj respektive praktikas aŭ posedas, aŭ supozeble praktikas aŭ posedas, sur siaj respektivaj Teritorioj kiel la Solaj Suverenoj de ili.

Artikolo La Dua

Ŝia Moŝto la Reĝino de Anglio konfirmas kaj garantias al la Ĉefoj kaj Tribroj de Nov-Zelando, kaj al ties respektivaj familioj kaj individuoj, la tutan senesceptan kaj senĝenan posedon de iliaj Teritorioj kaj Bienoj, Arb-aroj, Fiŝejoj, kaj aliaj propraĵoj, kiujn ili eble kolektive aŭ Individue posedas, dum ilia volo kaj deziro reteni ilin en sia posedo; sed la Ĉefoj de la Unuiĝintaj Tribroj kaj la Individuaj Ĉefoj cedas al Ŝia Moŝto la senesceptan rajton de Antaŭaĉeto sur tiuj parceloj, kiujn ties Proprietuloj eble inklinas alieni, je tiuj prezoj, al kiuj konsentas la respektivaj Proprietuloj kaj personoj asignataj fare de Ŝia Moŝto por trakti kun ili por tiu intereso.

Artikolo La Tria

Konsiderante tion Ŝia Moŝto la Reĝino de Anglio etendas al la Indiĝenoj de Nov-Zelando Sian Reĝan protekton, kaj donas al ili ĉiujn Rajtojn kaj Privilegiojn de Britaj Regn-

anoj.

Traduko de la maoria versio:

Jen La Unua

La Ĉefoj de la Federiĝo, kaj ankaŭ ĉiuj Ĉefoj kiuj ne aliĝis al tiu Federiĝo, tute cedas al la Reĝino de Anglio por ĉiam la tutan Regadon de siaj teritorioj.

Jen La Dua

La Reĝino de Anglio aranĝas kaj konfirmas al la Ĉefoj, al la klanoj, kaj al la tuta popolo de Nov-Zelando, la tutan ĉefecon de iliaj teritorioj, iliaj vilaĝoj, kaj ĉiuj iliaj posedaĵoj. Tamen la Ĉefoj de la Federiĝo, kaj ĉiuj Ĉefoj, lasos al la Reĝino, aĉeti parcelojn de teritorio, je prezo al kio konsentos la posedanto de la teritorio, kaj la aĉetonto kiun la Reĝino nun asignas por esti sia peranto.

Jen La Tria

Ĉi tio estas aranĝo por la konsento al regado de la Reĝino. La Reĝino de Anglio protektos ĉiujn maoriajn personojn de Nov-Zelando. Cedigoj al ili ĉiuj rajtoj same kiel al la homoj de Anglio. □



Por Ridigi Vin

“Kiam vi pagos al mi la kvin ŝilingojn, kiujn vi ŝuldas al mi?”

“Ne estas kvin, ili estas dek,” diras la ŝuldanto.

“Vi eraras, mi nur pruntedonis al vi kvin ŝilingojn.”

“Ho! Mi preferas ŝuldi al vi dek ŝilingojn, ol pagi al vi kvin.”

[el *The Australian Esperantist* decembro 1908]

Bananolanda kuracisto al sia kunulo:

“Mi tre eraris hodiaŭ matene. Mi operaciis sur malsanulo kaj li ne havis tion, kion mi supozis.”

“Ah,” diris la kunulo, “li ne havis apendiciton?”

“Ho jes,” respondis la kuracisto, “Li vere havis apendiciton, sed li ne havis monon.”

[el *La suda kruco* aŭgusto 1923]

Kiel Kontribui al Esperanto sub La Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas ricevi kontribuojn per e-poŝto. Surpaperaj tekstoj devas esti klare tajpitaj per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Limdato por la novembro-decembra numero: 5a de oktobro 2007

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.

Esperanto Sub La Suda Kruco
P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio
esk@esperanto.org.au



La Aŭstralia Esperanto-Asocio

143 Lawson St • Redfern NSW 2016 • Aŭstralio
<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: **Igor Couto** | prezidanto@esperanto.org.au

Sekretario: **Miranda Lutz** | sekretario@esperanto.org.au

Kasisto: **Stephen Pitney** | kasisto@esperanto.org.au

Membreco: \$50 por individuo aŭ klubo [+ \$6 por familiano(j) ĉe la sama adreso].

Por studento aŭ pensiulo: \$25. Asocia membreco: \$12.

Membrecaĵojn sendu al sekretario@esperanto.org.au



La Novzelanda Esperanto-Asocio

P.O. Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • Novzelando
<http://www.esperanto.org.nz/>

Prezidanto: **David Ryan** | <http://www.ryangomez@xtra.co.nz/>

Kasisto: | **Don Rogers** | don-cles@ihug.co.nz

Sekretario: **Bradley McDonald** | bradley.m@xtra.co.nz

Membreco: \$40 por individuo, \$50 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo
(<20-jara: Klubo: \$1 por ĉiu ano

Sendu vian kotizon al la Kasisto ĉe la asocia adreso

Wholly printed in Australia.
Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302.
Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

Septembro-Oktobro 2007

if undeliverable return reply paid to
D. Broadribb • P.O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

POSTAGE
PAID
AUSTRALIA

PRINT POST
PP631048/0005